

La svisa stilo en la porinfana literaturo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-821/288, 1979 julio 05 kaj 07

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-42/SRI-1979-42-A-3-288-821-1979-07-05-07-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-svisa-stilo-en-la-porinfana-literaturo.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND, kiuj daŭrigas sian raporton pri la infanlibroj.

La vera eksplodo en la fako porinfanaj bildlibroj aŭ simple bildlibroj povis okazi nur meze de la 19-a jarcento pro la samtempa disvolviĝo de la presteknikoj, interalie de gravurado, kiuj permesis la reproduktadon de pli granda nombro da ekzempleroj, kaj la alfabetiĝo de novaj klasoj, kio multigis la eblajn aĉetantojn, kondiĉe ke la vendoprezco de la bildlibroj malaltiĝu. Kaj tiu ĉi prezmalaltiĝo okazis, ĉar la eldoniistoj konsciis, ke nur tiel ili varbos al si vastan klientaron.

A.- Sed bedaŭrinde, la teknikaj eldonmalkovroj ne favoris la presadon de altnivelaj libroj, sed kontraŭe la aperigon de ĝenerale malbonkvalitaj bildlibroj. Multaj pedagogoj, inter kiuj la germano Heinrich Wolgast, plendadis pri la plorinda nivelo de tiu porinfana amasproduktado, bedaŭrante ke neniuj priskribis la infanecon. Sed iom post iom izolitaj artistoj kreis verajn artlibrojn, anoncantoj de la bildlibroj, kiuj ekabundis en la 20-a jarcento.

Cl.- En 1860 la eldonejo Garniers Frères aperigis la albumojn de la ĝenevano Rodolphe Töpffer (1799-1846), kies manuskriptoj datumas jam de la jaroj 1825 - 1837. Tiuj longformaj volumoj bilde rakontas eksterordinarajn aventurojn de herooj karikature priskribitaj. La bildoj de tiuj albumoj eldoniĝis litografe kaj la desegno de la gravuristo plene harmonias kun la stilo de la verkisto.

A.- En 1898 la ankoraŭ nekonata artisto berna Ernst Kreidolf (1863 - 1956) kreas kaj eldonas "Die Blumenmärchen". Denise de Stokar diras pri li: "Lia verko reprezentas ĉefan etapon en la historio de la bildlibro moderna. Per sia delikata mesaĝo kaj sia rimarkinda arta kvalito, Kreidolf estas unu el la posteuloj de la "romantika" ĝenro. Li utiligas la formalan lingvon de la "Jugendstil". Liaj litografoj koloraj, kiujn li ĉiam memeldonis, reprezentas tekste kaj bilde flor-, plant-, best- kaj mit-kosmogonion perfekte harmonian arte, bele tre kaj teknike."

Cl.- Fakte la ĝenevano Töpfer kaj la bernano Kreidolf estis la antaŭuloj de kvalita artliteraturo porinfana kaj porjunlara.

A.- Inter la plej konataj ilustristoj svisaj de la komenco de la 20-a jarcento ni menciuj Witzig, Schnitter-Tappolet, Classen-Huber, Riggerberg kaj Hosch-Wackernagel. Ili kreis originalajn artaĵojn karakterizajn de la kultura medio, en kiu ili vivis. Sed tio reprezentas esceptojn rilate al la amasa produktado malaltnivela de tiu epoko.

Cl.- La progreso de la nacia socialismo (Nazionalsozialismus) en la Hitlera Germanio devigis la germanvisojn ekde la jaroj 1930 sin difini politike kaj kulture, sin distingante de la germana najbaro. Tiurilate la Nacia Ekspozicio starigita en 1939 en Zürich atestis la volon de la svisa popolo resti kulture aŭtonoma. Tiu ĉi volo interalie esprimiĝis per la eldono de porinfanaj bildlibroj arte altnivelaj. Alemanaj eldonejoj favoris la publikigon de porinfana kaj porjunlara literaturo tipe svisa. Inter ili ni menciuj la eldonejon "Kinder- und Jugend-Verlag

Sauerländer" en Aarau, kiu estas hodiaŭ potenca. Ĝi konigis hodiaŭ mondfamajn artistojn kiel Klaus Brunner, Hans Fischer, Felix Hoffmann, René Villiger, Walter Grieder kaj Jörg Müller.

A.- Tiu bezono sin difini rilate al la najbaro estis ĉefe alemana fenomeno. En Romandio oni ne sentis tiun ĉi bezonon samgrade. Tial franclingva Svislando restis pli dependa de Francio ol Alemanio de Germanio, kaj tio malhelpis la disvolviĝon de porinfanaj eldonejoj en Romandio, kontraŭe al tio, kio okazis en Alemanio. Konsekvence, la nuntempaj svisaj ilustristoj de porinfana literaturo, estas en sia granda plimulto alemanoj (germansvisoj) kaj iliajn verkojn bedaŭrinde malofte konas la romandoj (francsvisoj).

Cl.- Johanna Spyri kun sia fama rakonto "Heidi" aperinta en 1881 kaj J. D. Wyss kun sia "Svisa Robinsono" (1812), ambaŭ verkoj verkitaj por la infanoj, estas la patroj de la svisa stilo en la porinfana literaturo. Iliaj herooj kaj heroinoj estas realaj kaj vere vivantaj. Ili evoluas en vivmedio neniel eksterordinara. Ĝis tiam la infanojn oni nutris per plenkreskulaj verkoj por ili adaptitaj kaj fabelemaj. Kun la verkoj de Spyri kaj Wyss la realismo penetris en la porinfanan literaturon kaj tio sukcese. Ankoraŭ nun Heidi estas ŝatata heroino.

A.- En la ilustrado de la verkoj, kies temoj estis tipe svisaj, la artistoj fidele spegulis realajn pejzaĝojn. Oni vivas en vilaĝo kaj domo Engadina en "Schellen-Ursli" (Sonorilo por Ursli) de Aloïs Carigiet. Oni konatiĝas kun la regiono de Schaffhausen en "Die Rhein-Piraten" (La piratoj de la Rejno) de Hans-Peter Schaad. La herooj similas al la kamparanoj de centra Svislando en "Der Däumling" (Fingruleto) de Felix Hoffmann. Ni konatiĝas kun la etoso de la Kvarkantona Lago en "Der Knabe des Tell" (La Filo de Tell) de Paul Nussbaumer. Kun "la ronde des marteaux-piqueurs" (la rondodanco de la pikmarteloj) de Jörg Müller ni travivas kun ĉiuj detal-ŝanĝiĝoj la transformadon de eta angulo de Svislando. Jaqueline Blass en "Elisabeth wird geund" aŭ "Martine va guérir" (Elizabeta resaniĝos) priskribas tute ekzakte la vivon en porinfana hospitalo en Zürich.

Cl.- La tipaj pejzaĝoj de nia lando, kaj ili multas, ludas grandan rolon en tiuj ilustraĵoj de la porinfanaj bildlibroj, ne nur kiel dekoraĵoj al agadoj, sed ankaŭ kiel karakterizantoj de personecoj. Krom tiu ĉi pejzaĝa realismo, la porinfanaj bildlibroj estas karakterizataj de kelkaj ĉeftemoj: la ideo de libereco, la nocio de demokrata vivo, la familia harmonio. La venontan semajnon ni diros al vi kelkajn vortojn pri la maniero esprimi en infanlibroj tiujn iom abstraktajn nociojn.

A.- Ankaŭ popolrakontoj tre precize desegnitaj karakterizas la svisan stilon, kiu ŝatas la detaletojn, eĉ se ĝi provas doni ekstertempan impreson. Cetere en la plenkreskula pentroarto svisa oni retrovas ĉiujn tiujn karakterizaĵojn.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia pri la svisa stilo en la porinfana literaturo. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!